

# Sinceraj katolikoj demandas

*Mia nomo estas Bernhard Dura. Mian junaĝon mi travivis en la kantono Wallis en Svislando. Kiam mi havis 23 jarojn, mi vojaĝis Romon por servi al la papo kiel svisa gardisto. Havante 27 jarojn mi povis akcepti Jesuon en mian koron kaj vivon post aŭtentika konvertiĝo. De tiu tempo mi vivas en komuneco kun Dio. Pri mia vivo mi verkis libreton sub la titolo „Vom Gardisten zum Christen”, kiun mi volonte sendas al ĉiu, kiu trovas intereson por tio. En la Biblio mi trovis la respondon je miaj plej ardaj vivodemandoj. La demandoj de multaj sinceraj katolikoj estas por mi motivo ĉi tie prezenti kelkajn respondojn el la Biblio mem. Mi deziregas ke tiuj ĉi respondoj helpu al tiuj, kiuj sopiras pri trovi la nuran vojon, la nuran veron kaj tiel la eternan vivon kun Dio!*

- **Kion vi opinias pri la papo?** – La papo devos por siaj faroj samtiel respondeci antaŭ Dio kiel ĉiuj aliaj homoj. La kapo de la komunumo estas Jesuo Kristo (Efesanoj 1, 22); kiamaniere do la papo povus esti ilia estro? Jesuo diras en la evangelio laŭ Mateo 23, 8-9: „Sed vi ne estu nomataj Rabeno; ĉar unu estas via instruanto, kaj vi ĉiuj estas fratoj. Kaj nomu neniun sur la tero via patro; ĉar Unu, kiu estas en la ĉielo, estas via Patro.”

- **Sed la papo tamen estas la sankta patro...** – En la evangelio laŭ Johano 17, 11 Jesuo ĝuste uzante tiujn du vortojn alparolas Dion. Ĉu ne estas tute malkonvene tiamaniere nomi la homon?

- **Tamen la papo estas la anstataŭanto de Kresto sur la tero!** – La vera „Konsolanto”, kiun Jesuo promesis al siaj disĉiploj por transpreni lian lokon, estas la Sankta Spirito (sed ne Petro aŭ iu de la papoj; vidu: evangelio laŭ Johano 14, 16-26).

- **Ĉu la papo ne estas neerarebla?** – Dio la sola kaj Lia Vorto estas neerareblaj. La historio de la eklezhio tion sufiĉe klare pruvas.

- **La papo tamen vivas modelan moralan vivon!** – En la evangelio laŭ Luko 12, 33 la kristanoj el sia bonstato donacu almozon kaj havu sian trezoron en la ĉielo. Petro diras: „Mi havas nek argenton nek oron” (Apostolaj agoj 3, 6). Jesuo ne havis personan gardistaron. Konforme al tio li instruis ankaŭ siajn disĉiplojn (rigardu evangelion laŭ Luko 12, 4-7).

- **Ĉu Jesuo do ne konstruis sian eklezion sur Petro – la roko?** – Jesuo atribuis al Simono la nomon *Petros*, kio en la malnovgreka lingvo signifas malgrandan ŝtonon. Li mem estas la roko (gr.: *petra*), kiel ni povas legi en la 1-a epistolo al Korintanoj 10, 4, kaj sur tiun rokon li konstruis sian komunumon (Efesanoj 2, 19-29). Petro mem nomas la kredantojn ŝtonoj kaj Jesuon roko (1-a epistolo de Petro).

- **Ĉu Petro ne ricevis de Jesuo la ŝlosilojn de Dia regno?** – Tiu komisienco validas por ĉiuj kredantoj (evangelio laŭ Mateo 18, 18).

- **Ĉu la sacerdotoj tamen ne estas niaj edukistoj?** – Ĉiuj novenaskitaj kristanoj apartenas al pastraro reĝa de Dio (1-a epistolo de Petro 2, 9). „Sed vi ne estu nomataj Rabeno; ĉar unu estas via instruanto, kaj vi ĉiuj estas fratoj” (Mt 23, 8). Jesuo instruas nin per sia vorto, per la Sankta skribo.

- **Ĉu estas bone, ke la sacerdotoj vivas negeedzece?** – Tiu, kiu volas konduki la komunumon, vivu ordigitan familian vivon. „Se iu ne scias regi sian propran domon, kiel li zorgos pri la eklezio de Dio?” (1-a epistolo al Timoteo 3, 1-5).

- **Ĉu oni bezonas la mesoferon?** – Ĉiam denove sensange oferi Kriston sur la altaro – ĉu tio ne estas blasfemo? La Biblio diras: „Ĉar *per unu ofero* li perfektigis ĝis eterneco la sanktigatojn” (Hebreoj 10, 14). Jesuo pardonis ĉiujn niajn pekojn, kiujn ni sincere eldiras al li. Ĉiu aldona oferado prezentas Dion mensokanto (evangelio laŭ Johano 19, 30; Hebreoj 9, 25).

- **Kio pri la mesoj por la mortintoj?** – Post la morto la senmorta animo venas antaŭ la Dia tribunalo (Hebreoj 9, 27). Tiu, kiu en la tempo de sia vivo ekkonis la Dian gracon kaj akceptis Jesuon Kriston kiel sian personan savanton, tiu venos en eternan beatecon (evangelio laŭ Johano 3, 16; laŭ Luko 16, 2). Jesuo ne bezonus morti por ni surkruce, se la homoj povus helpe de pekliberigaj atestiloj kaj mesoj por la mortintoj akiri la savon. Neniu ricevos pravigon pro siaj faroj (Galatoj 2, 16; Efesanoj 2, 8-9).

- **Ĉu tute ekzistas la purgatorio?** – La vorto de Dio ne postlasas nin en necerteco. Se la purgatorio fakte ekzistus, Jesuo certe parolus al ni pri ĝi. Sed la Biblio diras, ke inter la savitoj kaj perditoj troviĝas netrasmirebla abismo (evangelio laŭ Luko 16, 26). Jesuo vokas nin nepre, ke ni estu konstante pretaj (do vivi en pardoniteco de la pekoj), ja ni ne scias pri la horo de nia paŝo en la eternon (evangelio laŭ Mateo 25, 13). Tiu, kiu mortas en siaj pekoj, troviĝos en la situacio kiel la kvinopo de malsaĝaj virgulinoj, al kiuj la fianĉo diris: „Mi ne konas vin!” (evangelio laŭ Mateo 25, 12).

- **Ja nenio malpura povas eniri la ĉielon!** – Jesuo pardonas jam ĉi tie sur la tero niajn pekojn en pleneco, se ni ilin bedaŭras kaj ilin konfesas al li (1-a epistolo de Johano 1, 9). Li promesis, ke li neniam plu pensos pri niaj pekoj (Hebreoj 10, 17). Kian sencon do havus ia purgatorio?

- **Mi alprenas Jesuon per la komunio.** – La vortoj de Jesuo: „Ĉi tio estas mia korpo” (evangelio laŭ Luko 22, 19) estas samtiel la metaforo kiel „Mi estas la pordo” (evangelio laŭ Johano 10, 9) aŭ: „Mi estas la vinberarbo” (evangelio laŭ Johano 15, 5). Ĉiufoje, kiam ni pensante pri la sufero de Jesuo kaj lia morto manĝas de la disrompitan panon en la komunumo kaj trinkas el la kaliko, ni anoncas, ke li por ni oferis sian karnon kaj sian sangon por nin elsavi. Partoprenante la komunuman vespermanĝon ni atestas esti la parto de la komunumo, ke ni apartenas al la korpo de Kristo (1-a epistolo al Korintanoj 11, 23-29). Dion oni ne povas enlokigi en ion objektan (Hebreoj 9, 24); Li ne plu estus vera Dio, se la homoj povus Lin manipuli. Oni ankaŭ Dion ne povas manĝi – Li ne restus ene de ni, sed forlasus nian korpon naturvoje.

- **Kiamaniere mi do povas alpreni Jesuon?** – Se mi ekkonas, ke mi estas perdita homo kaj ke Jesuo por mi mortis, tiam mi povas lin en persona preĝo inviti en mian vivon. Jesuo sopiras pri tio, ke ni konvertiĝu al li. Probable helpos al vi tiu-ĉi punkte la preĝpropono sur la lasta paĝo de tiu ĉi teksto.

**Sed al ĉiuj, kiuj lin (Kriston)  
akceptis, li donis la rajton fariĝi  
filoj de Dio.**

Evngelio laŭ Johano 1, 12

**Ĉu oni ne fariĝas la infanoj de Dio per suĉinfana bapto?** – Ne troviĝas iu biblia tekstero, kiu menciis baptadon de (suĉ)infanoj. Jesuo benis la infanojn, sed li ilin ne baptis (evangelio laŭ Marko 10, 13-16). Antaŭ la biblie konceptita bapto ĉiam troviĝas la akcepto de persona fido en Jesuon Kriston (Apostolaj agoj 8, 36-38). La bapto ne savas nin; ĝi estas persona atestado antaŭ la videbla kaj nevidebla mondoj, ke ni

apartenas al Jesuo Kristo (evangelio laŭ Mateo 28, 18-20). Se la baptado de infanoj kongruus kun la volo de Dio, Jesuo kun certeco ĝin enkondukus kaj igus ĝin menciit en la Biblio, kiel ekzemple en la Malnova testamento rilate la cirkumcidon de la infanoj (1-a libro de Moseo 17, 12).

- **Ĉu oni ne ricevas la Sanktan Spiriton okaze de la konfirmo?** – La Spiriton de Dio oni ne povas distribui per homaj proceduroj. Neniu troviĝas super Dio. Jesuo Kristo donacas al ni la Sanktan Spiriton kaj tiel la eternan vivon okaze de nia novnaskiĝo, do tiam, kiam ni disponigas ali li nian vivon. La Dia Spirito donas al nia spirito la certecon, ke ni estas la infanoj de Dio (Tito 3, 4-6).

- **Ni kredas, ke Maria, la patrino de Jesuo, nin helpas.** – La jam mortintaj homoj ne povas nin helpi (evangelio laŭ Luko 16, 27-31). Samtiel ne Maria, ja Jesuo mem diras al ŝi: „Kio estas inter mi kaj vi, virino?” (evangelio laŭ Johano 2, 4). Tial oni devus sekvi la konsilon de Maria: „Kion ajn li diros al vi, tion faru” (evangelio laŭ Johano 2, 5).

- **Kial oni ne preĝu al Maria?** – Dio nin malpermesas iel ajn kontakti la mortintojn (5-a libro de Moseo 18, 11). Maria estis la homo kiel ni; kiamaniere ŝi povus plenumi la deziron de ĉiu unuope, ja miloj kaj miloj preĝas al ŝi? Ŝia gepatra lingvo estis la aramea, do ŝi eĉ ne povus nin kompenti. Nur Dio sola povas nin aŭdi, kompreni kaj respondi al ni, kiam ni venas al Li per sincera koro (Jesaja 59, 1)

- **Oni instruis min, ke Maria estas peranto de ĉiuj gracoj.** – Jesuo Kristo estas la sola peranto inter Dio kaj homo (1-a letero al Timoteo 2, 5). Li troviĝas dum ĉiuj tagoj inter ni (la evangelio laŭ Mateo 28, 20). Li volas, ke ni venu al li (evangelio laŭ Mateo 11, 28). Kiel ĉiuj mortintaj sanktaj Maria ne plu vivas surtere por povi ion ajn peri.

- **Ĉu tiel la rozario ne estas la preĝo de granda helpo?** – Se ni konfesas al Jesuo niajn pekojn, li estas fidela kaj justa rilate sian promeson kaj li pardonas al ni ĉiujn niajn pekojn (1-a letero de Johano 1, 9) kaj ilin ne memoras plu (Hebreoj 10, 17). Post tio ni antaŭ Dio ne plu estas pekantoj. Sed se ni preĝas: „Ave Maria, Dipatrino, preĝu por ni pekantoj, nun kaj en la horo de nia morto”, tio signifas perfidon rilate Jesuon. Nome, Jesuo jam ĉi tie sur la tero volas donaci al ni la eternan vivon (evangelio laŭ Johano 5, 24). La kristanoj ne bezonas timi antaŭ la morto, ja Dia majesteco ilin atendas (1-a epistolo de Johano 5, 13).

- **Maria aperadis en Lourdes, Fatima kaj sur aliaj lokoj!** – Ni devas konsideri, ke Satano disponas ankaŭ pri miraklaj fortoj kaj li povas aperi kiel anĝelo de la lumo kaj sub la nomo de Dio (2-a epistolo al Korintanoj 11, 14). Ni ne forgesu, ke li volis tenti eĉ la Filon de Dio mem, montrinte al li ĉiujn regnojn de la mondo kaj tiel validigi ĉe li siajn proprajn aŭtoritatajn postulojn (evangelio laŭ Luko 4, 5-7). Ĉiujn aperojn oni devas enketi surbaze de la vorto de Dio. Koncerne la aperojn de Maria la honoro ne estas atribuita al Jesuo; la protekto kaj la helpo estas promesitaj sub falsa nomo. Sed la savon ni povas trovi nur en la nomo de Jesuo (Apostolaj agoj 4, 12). Ĉiu „alia evangelio” troviĝas sub la malbeno de Dio (Galatoj 1, 6-8). – Rilate ĉion-ĉi stariĝas la demando pri la aŭtentikeco de Maria, se ŝi aperas jen blanka-, jen nigrahaŭta, jen kun la krono, jen sen ĝi, en diversaj vestoj kaj formoj.

- **Ĉu Maria estis sen la origina ĉpeko? Ĉu ŝi neniam pekis?** – Kiel oni povas konkludi el la letero al Romanoj 3, 23, pekis ĉiuj homoj senescepte. Maria mem glorigis Jesuon kiel sian Savanton (evangelio laŭ Luko 1, 47), do ŝi bezonis la savon. Jesuo Kristo estas la sola homo, kiu neniam pekis (1-a epistolo de Petro 2, 22). Li estis en plena senco la homo kaj plena Dio.

- **Ĉu Maria ne restis virgulino?** – Maria restis virgulino, ĝis ŝi naskis Jesuon (evangelio laŭ Mateo 1, 25). Poste ŝi naskis ankoraŭ kvar filojn: Jakobon, Joseon, Judason kaj Simonon; kaj ankaŭ filinojn en nekonata nombro (evangelio laŭ Marko 6, 1-6). La biologiaj fratoj de Jesuo kontraŭstaris lin en unua periodo (evangelio laŭ Johano 7, 3-7).

- **Sekve Maria ne estis prenita en la ĉielon?** – La Biblio mencias la ĉielprenon de Henoh (1-a libro de Moseo 5, 24) kaj de Elija (2-a libro de Reĝoj 2, 12). Pri Maria la Biblio ne diras ion similan. Sed ĝi diras pri la kondamniteco super tiuj, kiuj al la vorto de Dio ion ajn aldonus (Apokalipso 22, 18).

- **Ĉu ni rajtas preĝi al la anĝelo-gardanto?** – En la Apokalipso 19, 10 ni vidas, kiel Johano volis preĝi al la anĝelo, sed tiu lin admonis: „Gardu vin ke vi tion ne faru! ... Adorkliniĝu al Dio!”

\* \* \*

Por la fino mi volas, kara leganto, kara legantino, noti ankoraŭ kelkajn demandojn:

- Ĉu vi repaciĝis kun Dio (2a epistolo al Korintanoj, 20)?
- Ĉu vi ricevis plenan pardonon de ĉiuj viaj pekoj (1-a epistolo de Johano 1, 9)?
- Ĉu Jesuo vivas en via koro (la evangelio laŭ Johano 1, 12)?
- Ĉu vi havas la certecon de la saviteco (1-a epistolo de Johano 5, 13)?

Se vi ĉiujn-ĉi demandojn ne povas respondi jese, konfirme, mi volas vin inciti, ke vi en tiu ĉi sama momento vin turnu al la Sinjoro Jesuo kaj konfesas al li vian vivon. Tion vi povas fari ekzemple iel-tiel:

**„Sinjoro Jesuo, vi portis kaj pagis sur la kruco sur Golgota ankaŭ mian ŝuldon kaj mi konfesas mian ŝuldon antaŭ vi. Mi bedaŭras, ke mi pekis. Pardonu al mi ĉiujn miajn pekojn, purigu mian koron kaj mian konsciencon. Liberigu min de ĉiuj ligoj kun la malbono. Mi antaŭmetas al vi ĉiujn kampojn de mia vivo, por ke vi povus loĝi en mi kaj min konduki. Mi dankas vin, ke vi plene pardonis al mi kaj donacis al mi la eternan vivon. Knduku min per via Sankta Spirito kaj ne permesu, ke mi iam ajn denove foriru de vi. Amen.”**

Se vi tiel sen iu ajn rezervo vin konfidis al Jesuo, la Spirito de Dio atestos al vi, ke vi venis el la morto en la vivon kaj ke vi por la tempo kaj por la eterneco estas savita (evangelio laŭ Johano 5, 24). Nun endas postsekvi Jesuon. Legu ĉiutage en la Biblio; jen tio estas la Dia kondukilo por nia vivo. Per la helpo de Dio ni povas sperti, kiel ni mortis por la peko (Romanoj 6, 2.11). „Kaj se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan. (1-a epistolo de Johano 2, 1). Dio volas, ke ni estu senĉese pretaj por la dua alveno de Jesuo. Tio signifas, ke ni devas vivi en la pardoniteco de niaj pekoj. Sen la konsekrita vivo nome, neniu vidos Dion (Hebreoj 12, 14).

Tuj hodiaŭ kaptu la savon, proponatan al vi de Jesuo! Kiu garantias al vi, ke vi morgaŭ troviĝos ankoraŭ inter la vivantaj?

Jesuo diras:

**„Jen mi staras ĉe la pordokaj frapas;  
se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas pardonon,  
mi eniros al li.”**

(Apokalipso 3, 20)